N. N. 07,

La pensoj de la hom'

tradukita de Hans-Georg Kaiser

La pensoj de la hom'
liberas kaj restas,
laŭ nokta fantom'
kaŝite ja estas.
Ĝin hom' nek divenas
nek ĉenoj katenas.
Do restas laŭ senc',
ke liberas la pens'!

Mi pensas kun plezur',
kverelojn evitas.
Sekrete mi nur
pri ĉio meditas.
Dezirojn- vi sciu,
malhelpas neniu,
ĝi restas laŭ senc',
ke liberas la pens'!

.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....

. . .

Se iu ĵetos min
karceren ĉepane,
mi simple diras lin:
“Vi agas ja vane.
La pensoj trapasos
kaj murojn frakasos
per forta potenc’,
ĉar liberas la pens’.”

Kaj tial ĉe la fin’
mi zorgojn forŝovu,
ke vivgoĵo min
do daŭre plu movu.
Mi povas sentime
beati anime
laŭ sento kaj mens’,
ĉar liberas la pens”!

Traduko de la Germana poemo “Die Gedanken sind frei” de N. N. 07 en Esperanton de Hans-Georg Kaiser *(Cezar, ∗1954-05-21).*

Arg-286-582 (2010-09-19 18:46:36)

Germana popolkanto. Vortoj de “fluganta folio” (1780)